

Jarraporto 2018

traktota dum la landa kunveno 2021

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

Aperis artikolo pri *Esperantister i Tromsø* (iTromsø 27.4.2018 retversio, iTromsø 28.4.2018 p. 30 papera eldono). Cetere ni registris entute 18 noticojn/menciojn pri Esperanto aŭ pri NEL, kaj nekrologojn pri Pepita de Caspary, en diversaj gazetoj.

Interreto

Ni havas retpaĝaron kaj retpoŝtan sistemon. Ilin administras Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelle Abrahamsen. La retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Ni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL tie. Krom tio la ĝisdatigoj estis maloftaj, parte pro manko de taŭgaj novaĵoj. Ankaŭ NJE havas retpaĝojn, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

NEL havas la konton @esperantonytt ĉe *Twitter*, sed ne okazis aktivado tie dum 2018. NEL estas ankaŭ en *Facebook* sed okazis nur malmulte da aktivado tie.

Informbudoj/prelegoj

La 1-an de septembro la klubo de Tromsø partoprenis grandan, lokan aranĝon: *Frivillighet i sentrum – libervoleco en la centro*, kun informbudo.

En Oslo estis tritaga informbudo dum la Mela-festivalo.

Informado en la norvega

Esperanto-nytt unupaĝa (A4) aperis regule, trifoje dum la jaro kaj estis dissendita rete al interesiĝantoj 90 (70) kaj al NEL-inform, kaj ni afiŝis ĝin ĉe esperanto.no/e-nytt.

Ne eldoniĝis novaj broŝuroj en 2018. Ni ankoraŭ havas iom da broŝuro *Oppdag esperanto* de 2012.

Informpetoj

Venis kelkaj informpetoj dum 2018, kaj rete kaj ĉe porde en la oficejo en Oslo.

B. Instruado

Ĉeestaj kursoj

Neniu klubo aranĝis Esperantokurson en 2018. En Oslo okazis kunveno por partoprenantoj de la retkurso Duolingo kien venis du duolinganoj kaj unu alia novulo. Ni poste invitis al 2 similaj kunvenoj kaj 1 neformala, sed tiam neniu venis.

Interretaj kursoj

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj, lernu.net kaj duolingo.com.

Ekzamenoj

La Ekzamena Komisiono malfondiĝis en 2017. La estraro proponas KER-ekzamenojn por tiuj, kiuj volas havi ekzamenon.

Instruantoj

Neniu membro petis subtenon por lerni instruadon en 2018.

Faksekcio de instruistoj

La faksekcio ankoraŭ “dormas”. La peradon de la norvegaj ILEI-kotizoj kaj la mastrumadon de la konto de la instruista sekcio prizorgas la kasisto de NEL, Anne Karin Bondhus.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Kongreso

En 2018 ne okazis Landa Kongreso.

Seminario por membroj

La 12-an de majo okazis seminario de NEL surŝipe al Oslo de Kopenhago, kiel parto de la Skandinava Kongreso. Ĉeestis ok membroj de NEL kaj sep membroj de la Sveda Esperanto-Federacio.

Mario Machlik montris bildojn pri sia vojaĝo en Japanio, Otto Prytz faris prelegon pri la norvega verkisto Johan Falkberget kaj Herman Raner rakontis pri la pasintjara UK en Seŭlo.

Norvega Esperantisto

Ankaŭ dum 2018 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn. Eldoniĝis 6 numeroj, du havis 20 paĝojn, tri havis 16 kaj unu havis 12 – inkl. de *Inter Ni Dirite* (la junularaj paĝoj) en la plej multaj numeroj. Redaktis Douglas Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelle Abrahamsen; presis NTNU Grafisk senter, Trondheim.

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al 2 (2) norvegaj kaj 4 (4) eksterlandaj pagantaj abonantoj, 1 (1) norvega kaj 7 (7) eksterlandaj donac-abonantoj; ni sendis ĝin senpage al 5 (5) norvegaj kaj 25 (25) eksterlandaj ricevantoj, kaj interŝanĝe al 20 (20) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Cetere ni sendis la gazeton papere kaj senpage al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Tio estas sume iom sub la minimuma nombro (200) por havi rabaton pri la sendo. Ni suplementis sendante al norvegaj informpetintoj kaj interŝanĝe al aliaj landaj organizoj.

Retlistoj

La retpoŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgrupp*a. Per ĝi estas atingeblaj 60 membroj (60), kaj sendiĝis 32 mesaĝoj (58).

La diskutlisto *NEL-diskut* estas malferma por ĉiuj. En 2018 membris tie 37 (37) personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. La liston administris Jardar Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 2 mesaĝoj (7).

Lokaj kluboj

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2018 sendis la kluboj de Oslo, Tromsø kaj Trondheim.

Nur la Oslo-klubo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Trondheim kaj Tromsø havas retpaĝojn en TTT.

La klubo de Oslo kunvenis du fojojn monate, sed en julio kaj aŭgusto nur kiam venis gasto(j) el eksterlando. La nombroj de ĉeestantoj variis de 4 ĝis 9; meza nombro en la ordinaraj kunvenoj, inkl. de gastoj, estis 5,0 (5,6) – ĉ 10 % de la membraro.

Kiel ŝtatan subvencion por la jaro 2017 la klubo ricevis 4 360 kr (3 940 kr) tra la studasocio *Næring og samfunn*.

La klubo en Tromsø kunvenis 12 fojojn dum la jaro. Interalie vizitante teatraĵojn. La klubo partoprenis en la procesio de la 17-a de majo.

Grupo Esperantista de Trondheim kunvenis ordinare 14-foje kaj krome okazis jarkunveno kaj du festoj. En la ordinaraĵ klubkunvenoj partoprenis 3–8 membroj, averaĝe 5,2. La klubo membras en *Grasrotandelen*, kaj ricevis de *Norsk Tipping* 3795,40 (2323) kronojn dum la jaro. Tra la studasocio *Næring og samfunn* la klubo ricevis 500 (1000) kr.

La klubo de Bryne kunvenis proksimume 5 fojojn, hejme ĉe la membroj.

La aliaj kluboj ne raportis iun agadon.

NEL-estraraj protokoloj

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

Ne estis aktiveco en 2018.

Haveblas provizora listo de vortoj kiuj mankas en la norvega–Esperanto vortaro de 1963. 16 p. A5.

Turismo

Oficiale rajtigita ĉiĉerono pri Oslo en Esperanto, Cato Haugen, en 2018 transloĝiĝis al Telemark.

D. Administrado

Retservilo

Pro historiaj kaŭzoj la retdomajnnon esperanto.no formale posedas *Akademisk esperanto-forum*. La retpaĝaro kaj retroŝta sistemo situas ĉe la firmao *Initio Medielab* en Trondheim.

La oficejo

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri

arĥivado. La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto. Okazis 8 (9) retaj estraraj interkonsiliĝoj.

Teknikaĵoj

Herman Raner en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj, zorgante pri diversaj agordoj laŭbezone.

La Esperanto-Domo (Esperantonia)

NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. Ekde 2008 la Oslo-klubo ricevas 60% el la luig-enspezoj.

Membrostatistiko por NEL en 2018

En 2018 NEL havis 6 aliĝintajn klubojn (7 en 2017). La klubo en Hamar malfondiĝis en 2017.

La membronombroj estis en 2018 (2017):

Bergen	10	(11)	Stavanger	4	(4)
Bryne	7	(8)	Tromsø	16	(15)
Hamar	–	(2)	Trondheim	13	(14)
Oslo	46	(47)			
<hr/>					
Kluboj sume	96	(101)			
Rektaj	31	(26)			
<hr/>					
Membroj entute	127	(127)			

Eliris 8 (13) membroj, kaj mortis 0 (2) membroj. Ni ekhavis 3 (2) novajn membrojn, kaj 5 (4) malnovaj membroj remembris.

Membroj laŭ kategorio:

<i>Klubanoj:</i>			<i>Rektaj:</i>		
Ordinaraj	56	(60)	Ordinaraj	22	(20)
Junulaj	14	(12)	Junulaj	3	(1)
Samdomaj	5	(6)	Samdomaj	0	(0)
Dumvivaj	21	(22)	Dumvivaj	6	(5)

Ekonomio

La nova kasisto de NEL, Claude Rouget, elektita dum landa kongreso en Tromsø en majo 2019, havis malfacilan taskon. Anne Karin Bondhus estis kasisto de NEL dum du jardekoj kaj ŝi havis superrigardon pri ĉio, zorgis pri la financoj de NEL per ampleksa kaj kompleksa kalkulpaĝo, preskaŭ profesinivela.

Kunlabore kun la estraro, la kasisto proponis draste simpligi la jarkalkulojn, tiel ke ĉiu membro de NEL facile komprenu la sumojn. Tial la domkonto malaperis el la jarkakulo, kaj la nunaj kompilaĵoj malfacile kompareblas kun la jarkalkuloj de NEL 2017 (la lastaj kiujn Anne Karin sukcesis prepari dum sia malsano, vd. N.E. 1/2019).

Spezokonto de NEL en 2017 estis malprofita je 6578 kronoj, ĉefe pro neatendita kosto de riparoj kiujn nia loĝejkooperativo decidis, dividante la koston inter ĉiuj posedantoj, do ankaŭ NEL. En 2018, la ordinara spezo estis profita, danke al signifa kresko de donacoj, entute 15029 kronoj! Tamen la saldo de la spezokonto iĝis malprofita je 3408 kronoj pro malvaloriĝo de fonduso *Skagen Vekst* dum 2018.

Legaco Rolf Uhlen

La legaco Uhlen havas paĝon en nia retejo www.esperanto.no .

Ĝi ne donis subvenciojn en 2018.

La kapitalo je la fino de 2018 estis 1 026 254 kr. (Netuŝebla: 700 585 kr.)

Reprezentantoj de NEL:

- Herman Ranes (prez.), kun anstataŭanto Leif Arne Storset
- Judith Parelle Abrahamsen (kas.), kun anstataŭanto Bård Hekland

Ĉar NEFA (Norvega Esperantista Fervojista Asocio) en la realo malfondiĝis (pro mankantaj membroj), la reprezentantoj de NEL laboras nun pri nova statuto de la legaco, kiun la estraro de NEL devos aprobi.

Norvega Junularo Esperantista

En 2018, NJE aranĝis kvar kunvenojn, ĉiuj de ili okazis en Oslo, kie loĝas la plejmulto de la estraro kaj la membraro. Ili estis la jenaj:

- Novjara kunveno en januaro kun kvin partoprenantoj
- Somera kunveno kun ekskurso al Langøyene en julio kun sep partoprenantoj.

— Duolingva informkunveno en Esperantonia en septembro. Kunlaboris tri membroj de NJE, krom Douglas Draper, kaj venis tri interesuloj kiuj lernis iomete da Esperanto je Duolingvo.

– Neformala kunveno en *Crow Bar* en Oslo en septembro. Partoprenis kvar membroj.

Krom tiuj aranĝoj, partoprenis membroj de NJE en diversaj internaciaj kunvenoj.

Ni ankaŭ aranĝis Mojosan Vesperon, nian kutiman retan babilkunvenon, sesfoje (9) dum 2018. Partoprenis kutime inter 5 kaj 10 personoj, el diversaj landoj, inkluzive Danio, Svedio, Finnlando kaj Britio.

Estis du estrarkunvenoj dum la jaro. La nunaj estraranoj, elektitaj ĝis 2019, estas la jenaj:

- prezidanto: Vidar Benjamin Skretting
- vicprezidanto: Matias Särkelä Jentoft
- sekretario: Leif Arne Storset
- kasisto: Hilde Lagnason Bye

Jacob Grevstad reprezentas NJE-on en TEJO kiel Komitatano A.

Biblioteko

En Esperantonia ni havis en 2018 ĉirkaŭ 30 bretometrojn da libroj kaj kajeroj. Centra responsulo pri la Biblioteko estas Douglas Draper. Librojn kiujn ni havas 2- aŭ pli-ekzemplere ni ofertas per www.esperanto.no → movado → biblioteko por po 20 kr. Preskaŭ neniu aĉetis.

Granda kolekto da esperantolibroj troviĝas ankaŭ en la Nacia Biblioteko de Norvegio en Mo i Rana, de kie oni senpage povas prunti per ajna loka biblioteko. El ĉe 45 skatoloj da libroj forsenditaj al la deponejo tie en 2010 (ili akceptas po 1 ekz., sed de nordiaj 2, kaj de norvegaj 3), restas ne malfermitaj 16, ĉar nia membro Hilde Dahlberg ne plu rajtas registri ilin en sia labortempo. Tial ni ne povas scii kiuj libroj ne jam troviĝas en la deponejo. En la kolekto de Pepita de Caspary (ĉe 5 bretometroj), kiun ni heredis en 2018, povas esti libroj kiuj mankas tie.

Studenta Esperantosocieto

La societo ne estas formale malfondita, sed ekde 2013 ne estas aktivuloj ĉe la universitato de Oslo.

La estraro de NEL estis la sama en 2018 kiel en 2017:

- prezidanto: Mario Machlik
- vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Ulf Lunde
- kasisto: Anne Karin Bondhus
- estrarano: Lars Sandbakk
- anstataŭanto 1: Amelie Matt
- anstataŭanto 2: Heming Welde Thorbjørnsen

Resumo

2018 estis speciala jaro en la historio de NEL. Tiu ĉi jarraporto (kaj la jarkalkulo) ne pretiĝis ĝis la Landa Kunveno 2019 pro grava malsaniĝo de nia kasisto Anne Karin Bondhus. La nova kasisto, Claude Rouget, elektita dum la Landa Kongreso, laboris multe ne nur por finfari la jarkalkulon, sed ankaŭ por krei novan, pli simplan sistemon. Tio kompreneble postulis tempon, sed la rezulto verŝajne pli bone spegulas la grandecon kaj ambicion de nia organizo.

Printempe okazis sukcesa kongreso, kunordigita de la sveda, dana kaj norvega E-asocioj, kun preskaŭ 50 partoprenantoj. Tio okazis cent jarojn post la unua Skandinava Kongreso. Ni esperas, ke la kunlaboro inter tiuj landoj daŭros ankaŭ poste kaj plifortigos la movadon en nia regiono.

Ni ĝojas pro tio, ke la membronombro en 2018 ne plu sinkis, tamen por ŝanĝi la tendencon al kresko ni bezonus pli da laboro kaj pli da aktivaj membroj. Nia ekonomio daŭre estas kontentiga, sed ni havus signifan problemon sen donacoj de sume ĉ 15 000 kronoj.

La 12an de marto 2020

La Liga Estraro

Mario Machlik

Jardar Eggesbø Abrahamsen Bård Hekland, Amelie Matt,
Herman Ranes Claude Rouget Lars Sandbakk

Spezokonto de Norvega Esperanto-Ligo

2017 2018

Rimedoj			<i>Noto</i>
Membrokotizoj	36 850	36 180	
Kontribuo de E-klubo de Oslo	15 200	15 200	1
Donacoj	4 540	15 029	2
Kotizoj al skandinava kongreso		20 800	
Luigo kunvenĉambro k.s.	1 460	3 946	
Vendoj kaj abonoj	2 464	1 574	
Aliaj enspezoj	2 628	150	
Sumo de la ordinaraĵ rimedoj	63 142	92 879	
Kostoj			
Oficejo/domo (lupago, elektro, ktp)	52 494	32 276	3
Revuo (presado kaj sendado)	19 332	18 436	4
Landaj/skandinavaĵ kongresoj		21 682	
Kotizoj plupagataj al kluboj	8 460	7 170	
Subteno al Norv. Junularo Esp.	2 652	2 500	
Kotizo al UEA (aligitaj membroj)	1 090	1 188	
Kotizoj al eksteraj organizaĵoj	2 250	2 250	
Aliaj kostoj	3 211	4 745	5
Sumo de la ordinaraĵ kostoj	89 489	90 247	
Bankaj kaj financaj (mal)profitoj	11 794	-6 040	6
Eksterordinaraĵ enspezoj	7 975		
Saldo spezoj (malprofito)	-6 578	-3 408	

Noto

- 1 Kontribuo por uzo de la kunvenĉambro
- 2 Donacoj al domkonto: kr 9 000
- 3 Luo: kr 22 792; asekuro: kr 4363
- 4 Presado: kr 9 390; sendado: kr 9 046
- 5 Flegado de tombo de Haldor Midthus: kr.1950
- 6 *Skagen vekst* malkreskis je kr.7 642; *Skagen høyrente* kreskis je kr 1 576

Bilanco de NEL je 31-a de decembro**2017****2018**

Aktivoj			<i>Nota</i>
Oficejo (simbola valoro)	97 667	97 667	
Akcioj (<i>Skagenfondene</i>)	196 068	190 002	
Debitoroj/malŝuldoj	6 487	13 910	7
Norvega ILEI-sekcio	11 216	11 231	
Kontoj ĉe UEA kaj FEL	9 625	5 743	
Aliaj bankkontoj + kaso	74 397	67 024	8
Sumo de la aktivoj	395 460	385 576	
Pasivoj			
Ĝenerala kapitalo	250 734	244 156	
Saldo spezoj	-6 578	-3 408	
Propaganda fondaĵo	47 167	47 167	
Studfondaĵo	45 344	45 344	
Domkonto	23 593	23 593	
Mono de Bergen E-klubo	9 664	9 664	
Ŝuldoj (kreditoroj)	25 536	19 060	9
Sumo de la pasivoj	395 460	385 576	

Nota

- 7 E-klubo de Oslo: kr 13 280
- 8 Ĉefa konto ĉe DNB: kr 65 477; kaso: kr 1 096
- 9 Kotizoj plupagotaj al kluboj: kr 7 170; subteno al NJE: kr 2500; presado kaj sendado de N.E. kr 4 042; domluo jan+okt. 2017 (oficejo): kr 4 292

Claude Rouget, kasisto

Esperanto-literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ trovi ĉe typeit.org .

 Aŭ konvertu cx- aŭ ch-tekston ĉe liberafolio.org dekstramarĝene, plej malsupre.